# Luit Staghouwer: Elfstedentocht – Dek-unu-urba kurado

Sketado estas tre populara sporto en Nederlando. La sukcesoj dum la Vintraj Olimpikoj de 2014 en Soĉi tion klare pruvis. Sed la plej populara Nederlanda sketkonkurso estas la “Elfstedentocht”.

La Elfstedentocht (prononcu “Elfstedentoĥt” – la vorto laŭlitere signifas “Dek-unu-urba kurado”) estas proksimume 200 kilometrojn longa sketado sur natura glacio tra la provinco Frislando. Leeuwarden, la ĉefurbo de la provinco, estas delonge la forir- kaj alvenloko. La unua Elfstedentocht okazis la 2-an de januaro 1909 (partoprenis 23 “ŝatantoj”), kaj ĝi okazas maksimume po unu fojon vintre. La evento povas okazi nur se la kvalito de la glacio estas sufiĉe bona. Ĝis nun ĝi okazis 15 fojojn. La plej freŝdata Elfstedentocht estis en 1997 kaj la nombro de partoprenantoj tiam estis 16.738.

La itinero kondukas la partoprenantojn tra la dek unu urboj en Frislando kiuj iam ricevis urban ĉarton: de Leeuwarden (Frise: Ljouwert) al Sneek (Snits), IJlst (Drylts), Sloten (Sleat), Stavoren (Starum), Hindeloopen (Hylpen), Workum (Warkum), Bolsward (Boalsert), Harlingen (Harns), Franeker (Frjentsjer), Dokkum kaj denove returne al Leeuwarden.



La celo de la Reĝa Asocio “la Frisaj Dek Unu Urboj” estas organizi ĉiun jaron Elfstedentocht se eblas. Antaŭ ol la asocio povas komenci la organizadon de Elfstedentocht necesas ke sur ĉiuj partoj de la itinero la glacio estu minimume 15 centimetrojn dika. La itinero estas dividita en 22 distriktojn kaj por organizi la sketadon la asocio bezonas la konsenton de ĉiuj distriktestroj.

La distriktestroj respondecas pri diversaj taskoj: mezuri ĉiutage la dikecon de la glacio, prizorgi transplantadon de glacio, apliki antaŭrimedojn por la “klunen”, kontroli la sketantojn, anonci la trapasadon de la antaŭsketantoj, kaj certigi la sekurecon de la publiko.
Kompreneble en la itinero ĉiam estas iuj mallongaj partoj kie la glacio estas tro maldika aŭ eĉ mankas (i.a. sub pontoj) kaj tie la sketantoj devas “klunen”, tio signifas ke oni devas marŝi mallongan distancon sur siaj sketiloj. Por ke la sketiloj ne difektiĝu, tiuj partoj estas kovritaj per tabuloj kaj tapiŝoj.
Jam de 1997, la jaro en kiu okazis la lasta Elfstedentocht, ĉiun vintron la sketŝatantoj atendas la magiajn vortojn “It giet oan” (Ĝi okazos). Per tiu vortoj s-ro Henk Kroes, la tiama prezidanto de la Reĝa Asocio “la Frisaj Dek Unu Urboj”, anoncis ke oni decidis okazigi la eventon por la dek-kvina fojo.

Danĝera glacio

Ĉu la glacitavolo estas sufiĉe dika?

Ĉiu partoprenanto ricevas stampkarton dum la registriĝo. En la dek unu frisaj urboj kaj en du sekretaj lokoj estas kontrolstacioj. Tie la konkursosketantoj kaj la plezurosketantoj devas montri sian stampkarton. En la kontrolstacioj la kartoj estas (mane) stampitaj. Nur tiuj partoprenantoj kiuj povas montri karton kun ĉiuj stampoj kaj kiuj antaŭ meznokto transiras la finlinion en Leeuwarden ricevas la tiom deziratan medalon en la formo de kruceto (la "Elfstedenkruisje").

Konata trapasejo de la Elfstedentocht estas Bartlehiem kie la sketantoj dufoje preteriras, survoje de Franeker al Dokkum kaj returne el Dokkum al Leeuwarden.



La kahel-dekorita ponto en la vilaĝo Bartlehiem estas la lasta ponto sub kiu oni trairas antaŭ ol komenci la lastan parton de la sketkonkurso survoje al la finlinio sur la Bonkevaart (Bonke-kanalo) en Leeuwarden.
En la periodo 2001-2008 oni kovris la ponton de ĉi tiu Elfstedentocht-monumento per miloj da blue glazuritaj kaheloj de Makkumer Aardewerk (Fajencaĵo de Makkum), sur kiuj estas bildoj, nomoj kaj datoj de partoprenintoj de la evento. La bildoj de pli ol 7.000 Elfstedentocht-sketantoj estas sur la monumento. De sufiĉe granda distanco la miloj da kaheloj montras bildon de sketantoj irantaj unu post la alia.

Kiam okazas la Elfstedentocht, centmiloj da spektantoj spitas la malvarmon kaj kuraĝigas la sketantojn. Inter la partoprenintoj de la 14-a Elfstedentocht estis princo Willem-Alexander (la nuna reĝo), kiu partoprenis sub la pseŭdonimo W.A. van Buren. La fieraj gepatroj, reĝino Beatrix kaj princo Claus, atendis sian filon apud la finlinio en Leeuwarden.

La itinero de la unua Elfstedentocht en 1909 estis 189 kilometrojn longa kaj por tiu distanco la gajninto (s-ro Minne Hoekstra) bezonis 13 horojn kaj 50 minutojn. De tiam multo ŝanĝiĝis: la nunaj sketiloj kaj vestoj estas pli bonaj kaj la partoprenantoj estas pli bone trejnitaj. Interalie pro la cirkonstancoj ankaŭ la itinero ne ĉiam estis ekzakte la sama. En 1997 la itinero estis 199,6 kilometrojn longa kaj la unua partoprenanto (s-ro Henk Angenent) transiris la finlinion post 6 horoj kaj 49 minutoj.

En 1985 virinoj povis partopreni en la konkurso por la unua fojo. Tiam la unua alveninta virino estis Lenie van der Hoorn. Ekde la sekvonta fojo estos aparta konkurso por virinoj. Tiam unuafoje estos ankaŭ oficiala gajnintino.

La plej multaj vintroj dum kiuj okazis la Elfstedentocht, estis malvarmaj aŭ malvarmegaj, sed tio malmulte diras pri la vetero je la tago de la evento kaj la kvalito de la glacio. Precipe vento kaj neĝo povas fari la kondiĉojn tre malagrablaj, kaj ankaŭ post venta kaj ŝanĝiĝema frostperiodo la kvalito de la glacio estas nekontentiga. El la dek kvin oficiale rekonitaj Elfstedentocht-eventoj de la 20-a jarcento, tri okazis dum degelo, kvar dum malsevera frosto, tri dum modera frosto kaj kvin dum severa frosto (malpli ol -10 °C). La plej severa estis je la 18-a de januaro 1963, kiam la glacio havis multajn fendojn kaj la temperaturo dum la starto estis -18 °C. Ankaŭ posttagmeze modere frostis, sed pro la tempesta orienta vento la aero sentiĝis ekstreme malvarma. Krom tio estis polvoneĝo: du tagojn antaŭe Frislando kovriĝis sub 20 centimetrojn dika neĝotapiŝo.
Nur 1% de la 9.862 partoprenantoj atingis la finlinion, la malkulmino en la historio de la Elfstedentocht. S-ro Reinier Paping, la gajninto de ĉi tiu “heroa” konkurso, transiris la finlinion post 10 horoj kaj 59 minutoj. Estis la unua fojo ke la televido raportis pri la Elfstedentocht.

Ankaŭ la lasta Elfstedentocht, je la 4-a de januaro 1997, estis tre malfacila. Pri tio kulpegis vento kun forto de 5 ĝis 6 (sur la skalo de Boforto) kaj frosto kun temperaturoj de -6 °C dum la mateno ĝis maksimume -3 °C dum la posttagmezo. La kombino de vento kaj frosto efikis tiel, ke la temperaturoj sentiĝis inter -10 kaj -15 °C kaj eĉ ĉirkaŭ -18 °C dum skualoj. La Elfstedentocht de 1997 estis la plej malfacila depost la legenda sketado de 1963.

Krom la Elfstedentocht sur natura glacio, nuntempe ankaŭ ekzistas interalie vetbicikla, remboata kaj motorcikla Elfstedentocht.

Kiam okazos la venonta Elfstedentocht? Neniu scias.
La vintro estas plena je surprizoj.